Universala Esperanto-Asocio

**GAMO PRI LANDOJ**

**Estrara Subteamo: MOVADO**

*Estrara Komuniko EKO 2018-20 sendita el Budapeŝto, la 17an de julio.*

*Al: Landaj kaj Fakaj Asocioj de UEA (aliĝintaj kaj ne). Plie al la Komitato, Konsilianoj, regionaj komisionoj de UEA, ILEI-aktivuloj, TEJO-estraro, gazetaro, partoprenintoj en iuj AMO-seminarioj, aliaj listoj kaj unuopuloj.*

Por tuja uzo kaj plia diskonigo inkluzive de la alkroĉaĵoj kun indiko de fonto: EKO de UEA

# Akiru bildon de nia landa agado -- GAMO aktualigita

Fine de januaro UEA unuafoje en sia historio aperigis ampleksan novan analizon pri la stato de niaj landaj asocioj kaj landa agado. Ĝi klare montris, kiel rete liveritaj dokumentoj povas doni multe pli riĉan bildon pri niaj landoj ol iam ajn eblis per fizike presita Jarlibro. Reta Jarlibro havas sencon, nur se ĝi estas regule ĝisdatigita. Tial, la tuta prezento estis aktualigita fine de junio kaj jam aperas en nia asocia retejo.

Por rigardi la novan kompleton, iru al la retejo de UEA kaj rigardu la menuon ĉe 'Asocio'. Sube ni montras bildon de la loko por aliri la prezenton.

Uzeblas la sekva ligilo.

https://uea.org/asocio/gvidilo

**Jen la ĉefaj eroj, kiuj estis aktualigitaj por la nova eldono de junio 2018:**

- La nombro de Individuaj Membroj (IM) ĝisdatigitaj por 2017 laŭ la maja revuo *Esperanto*.
- Ĝisdatigo de la ciferoj pri la pagipovo de landoj (nominala MEP – angle GDP)
- Resuma tabelo de pagipovo (MEP) por la landoj de ĉiu regiono, tipe laŭ kvar kategorioj.
- Aldono de Kamboĝo kaj Laoso al la listo de landoj por Azio.



## IKUE dum UK – unuafoja pilgrimado al Fatima

La busligoj inter Lisbono kaj Fatimo estas bonegaj kaj biletojn oni povas ankaŭ anticipe aĉeti tra la paĝo www.rede-expressos.pt.

En la 31-an de julio (mardo) - je la 21.30h okazos procesio dum kiu oni preĝos kvin Saluton Maria en Esperanto. La pilgrimado al Fatima okazos en la 1-an de aŭgusto (merkredo) - je la 10.00h: rendevuo ĉe la statuo sur la placo de la Sanktejo (serĉu E-flagon) komuna eniro en la Kapelo de Aperoj - je la 10.30h SANKTA MESO EN ESPERANTO - je la 11.30h: Bruligo de la kandelo kaj komuna fotado - je la 12.00h: vizito al la vidindaĵoj per trajneto - de la 14.00h: libera programo (vizito al la muzeoj) kaj daŭrigo al Leiria



detalaj informoj: goo.gl/LdV1fK

aliĝilo https://goo.gl/forms/X3N4zLhEN2Shczeh2

#esperantofatimo #ikuealfatimo

# Sumoo resumas la jaron depost la antaŭa kongreso

En julio 2018 la programo allogis 286 homojn el 31 landoj, el kiuj elstaras Japanio (64), Koreio (32), Francio (32), Brazilo (31) kaj Pollando (17). Tiuj sumoj prezentas la averaĝon laŭmonatan tra la pasinta jaro. Ene de la periodo oni legis pli ol sep mil paĝojn, averaĝe unu homo legas 60 paĝojn dum 15 tagoj de sumoo-sesio. Partoprenantoj el DR Kongo multiĝis eble dank' al Sebuhore, kiu instruas Esperanton en DR Kongo kaj Ugando. Por tiu ĉi sumoo laboris Yu (Ĉinio), Aleksander (Pollando), Siva Naga (Barato), Ha (Vjetnamio), Raphael (Japanio), Arase kaj Jasuo (Japanio), Vasil (Turkio), Pradip (Nepalo), Anjo (Hungario), Rafaelo (Brazilo), Majo (Koreio) kaj Jitka (Italio). Monsano (Japanio) prizorgis sian japanan grupon. Prizorgas nian retejon kaj diplomojn Krystyna (Pollando). Ni dankas al tiuj kunlaborantoj.

Niaj retejoj: http://www.esperanto-sumoo.pl/
https://eo.wikipedia.org/wiki/Internacia_Esperanto-Sumoo
Fejsbuko: https://www.facebook.com/groups/759066970888217/?fref=ts

## Internacia LiteraturaKonkurso "Ĥristo Gorov - Hrima

Hristo Gorov – Hrima estis unu el la plej elstaraj bulgaraj esperantistoj, talenta Esperanta verkisto, poeto, tradukisto kaj publicisto. Bulgara Esperanto-Asocio anoncas Internacian Esperantan Literaturan Konkurson. En la konkurso povos partopreni geesperantistoj el ĉiuj landoj. La konkurso estos por **rakonto** kaj **eseo**. Ĉiu aŭtoro rajtas partopreni per unu rakonto aŭ per unu eseo, originale verkitaj en Esperanto. La rakontoj kaj la eseoj estu ĝis 4-paĝaj, komputile kompostitaj. La konkurso ne havas apartan temon. La gajnintoj ricevos valorajn premiojn. Bonvolu sendi viajn kontribuojn ĝis la 30-a de septembro 2018 al la retadreso: <modest@abv.bg> aŭ per la poŝto al adreso: Georgi Mihalkov, Sofio, BG-1229, "Vrabnica" 1, bl. 529 vh. A et. 9 ap. 33, Bulgario.

## Opero verkita kaj prezentita en Esperanto

Temas pri la opero ‘La Suferoj de Sternenhoch”, kun tekstoj en Esperanto, tradukitaj de Miroslav Malovec laŭ la romano de Vladislav Klima . Muzikon komponis Petr Kofron kaj la libreton Ivan Acher. La opero havis surprize grandan sukceson, ne nur de spektantoj sed ankaŭ de kantistoj, kiuj diris, ke Esperanton ili taksas kiel ideala lingvo por opero. Okazis kvin spektakloj kaj ĉiuj estis tute disvenditaj tuj post ĝia premiero - dum la tempo de unu semajno! Eĉ je du monatoj antaŭ la lasta spektaklo oni ne povis aĉeti biletojn.

Pavel Pavliĉek, gvidanto de la filmo-retejo Verda Stacio havis la eblon videoregistri la tutan spektaklon por arkivo. Bedaŭrinde li ne rajtas publike prezenti ĝin, nur eble kelkajn fragmentojn - post la permeso de la Teatro.

Fragmento, la lasta minuto de la opero, la 24-an de junio 2018 en Nacia Teatro en Prago.
https://www.youtube.com/watch?v=ZfSmjGuNH1I

## Malfaciliĝas la liverado de EKO

En la ekspedoj de la lastaj du komunikoj ni rimrkis kreskon en la nombro de resaltoj pro suspektata spamo. Kredeble tio iel rilatas al la novaj leĝoj en Eŭropo por protekto de privateco. Se la mesaĝoj ĉesas atingi vin, ĉiam rigardi en via spamkolektujon kaj (se vi daŭre volas ricevi la komunikojn!) marku ĝin ‘malspamo’. Se nenio troveblas tie, indas enrigardi viajn agordojn, rilataj al spamo.

Vortoj: 786

======================

Ĉi tiu komuniko estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde.
Por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.

Aperintaj komunikoj legeblaj kaj elŝuteblaj ĉe: http://aktivulo.net/eo/content/komunikoj-pri-agado. La prezento nun tute ĝisdata ĝis 2018-14. Vidu ilin laŭjare, kun klaraj enhavaj indikoj por ĉiu jaro.

**ALDONU VIN:** Skribu al <stefan.macgill<ĉe>gmail.com>. Neniu alira kondiĉo aldone al valida retadreso. Malferma al Aligitaj Membroj, eksmembroj, neniam-membroj, volapukistoj ktp.

**SUBTRAHU VIN:** Skribu al la supra adreso. Donu vian nomon, retadreson, landon kaj (se eble) la grupon aŭ kialon por via ĉeesto en la ekspedolistoj.